

ĈU VI JAM SCIAS ...?

→ pri Biblio-tradukado, ke ...

... Sergio POKROVSKIJ publikigis en tri sinsekvaj kajeroj de *La Ondo de Esperanto* (2008. n-ro 1, n-ro 2, n-ro 3) po unu recenzan eseon pri la ĵus aperinta *Biblio* eldonita de Kava-Pech. Tiu ĉi recenzo, modelo de la ĝenro, informas profunde kaj klare pri la eldonaĵo, donante samtempe lecionojn pri tradukarto, gramatiko kaj logiko. Ekzemplo de 'perloj' troveblaj en tiu esearo: [kiam oni parolas pri libro "unuakanona" kaj "duakanona"]

"temas ne pri kanonoj, sed pri agnoskovico: estis libroj tuj kaj sendispute agnoskitaj, kaj estis libroj kiujn oni agnoskis post iom da tempo kaj ekzameno; nu, en nia nuancoriĉa Esperanto tiun inĝenian interpreton esprimus aparta esperantigo: «unuekanona» (kiel «unuenaskita»), kaj «duekanona»."

Vi malkovros dekon da similaj perloj, se vi ne maltrafas tiun ĉi nepre legendan verketon.

→ Pri libroj ... ke

❖ ... okaze de UK en Roterdamo, Bero eldonis libreton poŝformatan, 62-paĝan, tradukitan el la angla far Rodney BOLT, titolitan *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj*, por konatigi la homojn en kies lando okazos la kongreso. Ĉi tiu libreto estas "ksenofobia" tiusence, ke ĝi priskribas la nederlandanojn de vidpunkto de fremdulo kiu vivas inter ili jam de multaj jaroj kaj priparolas ne nur iliajn nedubeblajn kvalitojn, sed ankaŭ iliajn tre baspajn difektojn (se vere pri difektoj temas). Amuza ironio kaj tolerema humuro legigas ĉi tiun eldonaĵon ĝis la fino en kelkdekoj da minutoj. Se vi ne estas nederlandano, ne maltrafu ĝin! Se vi estas tiu kaj vi ne timas iom da memvipado, vi ankaŭ eliros profiton el ĝi.

❖ ... aperis la dua libreto de *Beletra Almanako*, en marto 2008. Ĝi entenas 144 paĝojn zorge relegitajn kaj profesie kompostitajn. La ĉefplado estas eseo, kaj la ĝin sekvanta radiodramo: *Morgaŭ, ĉiam morgaŭ*, de Paul GUBBINS (31 paĝoj). El Belartaj Konkursoj 2007, ni havas la teatraĵon de Stefan MACGILL: *Aŭto-mato* (19 paĝoj). Plaĉis al ni la proza poemo de Baldur RAGNARSSON: *Reveno* kaj la longa poemo far WANG changyao, elĉinigitaj de MAO Zifu: *savo al homoj el abismo de mizero* (kune, 15 paĝoj).

La Reveno-n de Ragnarsson mi legis trifoje, kaj je la kvara legado mi aŭdis muzikon; provu tion! Christian Declerck ŝatis la poemojn en *Ĉiuj dioj estas for* de Ulrich BECKER kaj ni rajtas fidi pri lia juĝkapablo. En la eseo de Humphrey TONKIN, *Kaoso en Esperantio: eĥoj de la bolokaŭsto*, ni trovas liston de nepre legindaj libroj (Spomenka ŜTIMEC: *Tilla*; Zofia BANET-FORLANOWA: *La pereintoj in memoriam*; KERTÉSZ Imre: *Sen-sorteco*; SOROS Tivadar: *Maskerado ĉirkaŭ la morto: Nazimondo en Hungarujo*; Nina LANGLET: *Kaoso en Budapeŝto*) kaj interesajn informojn. En eseo, *Aurelius skribis a.P.* (a.P. signifas: antaŭ Paŭlo), Trevor STEELE, parolante pri sia libro *Kaj staros tre alte...*, diras pri Jesuo: "Jeŝu bar Josef estis elstara homo mense determinita de la juda civilizacio". Laŭdo de Jorge CAMACHO pri la lingvaĵo de "jOmO", kiu "kvazaŭ spegulas la averaĝan lingvaĵon de nuntempaj esperantuloj, [...], anstataŭ kabinete sputniki sur la paĝoj de libro hapaksojn en la vakuon". Tion ĉi ni povus diri ankaŭ pri la lingvaĵo de la plejparto de tekstoj aperantaj en *Beletra Almanako*.

❖ ... lastaj novaĵoj sur nia redakta tablo estas: *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?*, romano de Manuel DE SEABRA, en lingvaĵo matura kaj skua; *107 krucenigoj en esperanto*, de Stano MARĈEK, ideala por lerni sole aŭ en klubo; *Kroataj poetoj de la 20-a jarcento*, redaktita de Spomenka ŜTIMEC; *La Biblio – ĉu historio, ĉu legendoj*, brila ekzemplo de la sagaca kaj logika menso de CHERPILOD; *Tamen perdota*, novelo de Edmond PRIVAT kun reprodukto de lia manskriba teksto; *Senfina honoro, senfina adoro, nefinlegebla Dante*, historio pri emocia renkontiĝo de la poeto kun la fervora HU Guozhu.

❖ ... en venontaj kajeroj de LG aperos recenzoj pri: *Lingvaj aspektoj de Esperanto* de Bruno MIGLIORINI; *Universalaĵ lingvoj en Svislando* de Andreas KUNZLI; *Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj* de Sen RODIN; *La Morto en Venecio* de Thomas MANN tra Piet BUIJNSTERS; *Vortoj de la nokto* de Zdenka BERGROVÁ, tra Jaroslav MRÁZ; *Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj* de Nicolino ROSSI; *Dio, psiĉjo kaj mi*, la lasta romano de Claude PIRON.